

72ª HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO
72º CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO



Lingvo kaj Sento
Lengua y Sentimiento

Zaragoza, 3 - 5 majo / mayo 2013
www.esperanto.es

KONGRES-LIBRO

DE

72-a HEK

72-a HISPANA ESPERANTO-KONGRESO

Zaragoza, 3 – 5 majo 2013



La rivero Ebro: la eterna vivo de Zaragoza

ENHAV-TABELO

	paĝo 1
Saluto de la HEF-Prezidanto	paĝo 2
Bonvenon de la KOK (Kongres-Organiza Komitato) .	paĝo 3
Zaragoza, la kongres-urbo	paĝo 4
Esperanto en Aragono	paĝo 5
Lingvo kaj Sento	paĝo 6
Kongres-Programo	paĝo 7
Program-kontribuantoj	paĝo 8
Mapo	paĝo 16
Vizitindaj lokoj	paĝo 18
Aljaferio	paĝo 19
La Seo	paĝo 22
Releginde	paĝo 24
Listo de kongresanoj	paĝo 28
Listo de HEK (Hispanaj Esperanto-Kongresoj) . . .	paĝo 30
Ĝis revido... kaj DANKON!	paĝo 31
<i>ameN!</i>	paĝo 32



ORGANIZADO:



FRATECO
Asociación Aragonesa
de Esperanto
Esperanto-Asocio en Aragono



FEDERACIÓN
ESPAÑOLA
DE ESPERANTO
HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO



SALUTO DE LA HEF-PREZIDANTO

Karaj amikoj:

Mi deziras amike bonvenigi ĉiujn partoprenantojn de la 72-a Hispana Kongreso de Esperanto, nome de Hispana Esperanto-Federacio.

Kiam la aragona grupo "Frateco" proponis la kandidatecon de Zaragozo kiel sidejon por la Kongreso de 2013, ni ne dubis. Ni sciis ke la

urbo inde gastigos la kongresanojn, kaj proponos belegan kaj tre interesan kadron por la disvolvo de niaj laboroj. Jam en aliaj okazoj la aragona ĉefurbo montriĝis tre taŭga akceptejo por la hispana samideanaro, kaj ni neniel dubas ke ankaŭ ĉifoje ni havos la okazon konatiĝi kun la arĥitekturo, la historio, la etoso, sed ĉefe kun la homoj kiuj formas la ĉefan allogaĵon de Zaragozo.

Sed ĉefe ni kalkulis je la altega valoro de la zaragoza samideanaro. Inter niaj lokaj aktivuloj troviĝas kelkaj el la plej valoraj esperantistoj nuntempaj en Hispanio, kaj ni scias ke ni povas kalkuli je ilia entuziasmo kaj sindediĉo por atingi sukcesan kongreson.

Nia gastiga grupo ĝuas longan kaj fierindan historion. "Frateco" jam celebris en 2008 sian centan datrevenon, kaj dum tiu tempo sukcesis teni la flamon de Esperanto je alta nivelo. Ni ne forgesas ke dum grava parto de la historio de HEF, la zaragozaj aktivuloj fariĝis la motoro de la landa movado, el kiu ankoraŭ nun ni konservas heredaĵon. Tie ĉi oni fondis la Fondaĵon Esperanto, kiu ankoraŭ nun estas grava piliero de la movado en Hispanio – kaj tie ĉi la vorto "piliero" havas aparte trafan signifon, kiel ĉiuj hispanparolantoj bone konas.

Hispana Esperanta-Federacio kaj la tuta hispana esperantistaro do kore dankas la zaragozajn samideanojn pro ilia invito veni al ilia urbo kune ĝui kelkajn tagojn en plene esperanteca etoso kaj kun vere "frateca" sento.

Kiel trafe diras nia moto, "lingvo kaj sento", tio estas Esperanto. Kaj kiu pli bona sento ol tiu de FRATECO, por kunigi la esperantistojn en Zaragozo.

José Antonio del Barrio, prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio

BONVENON (al 72-a HEK)

- S** incere kaj senceremonie, ni kore (kaj akrostike) bonvenigas vin, kara kongresano (aŭ neokupata leganto).
- A** *BZ de la Amo* estas la titolo de sufiĉe fama (kaj ama) libro de la E-biblioteko. Ĉi tiu kongres-libro volas esti modesta gvidilo “ABKZ”: “*Al Bona Kongreso en Zaragozo*”. Zaragozo estas krucvojo trairita de multaj homoj, eĉ de esperantistoj kaj eĉ de Donkiĥoto(j).
- L**a preteksto, antaŭteksto, devizo, moto, (t)emo, mot(iv)o elektita por nia kongreso estas: “Esperanto: Lingvo kaj Sento”. Tia duopo de K. Kalocsay (aperinta en “Lingvo Stilo Formo”) povus esti moto por beletr-amantoj. Nia artefarita lingvo ja estas lingvo por arto. Jen kvar piedoj de nia “kongresa tablo”: lingvo, sento, literaturo kaj muziko.
- U**nuavice ni volas danki la helpemon kaj kunlaboremon de ĉiuj kiuj alportis ion por ĉi tiu kongreso. Kompreneble, la program-kontribuantoj estas niaj brilaj steluloj. Tamen ĉiuj estas iel eroj kiuj ebligis la kongreson. La kongreso esence estas la homoj: la kongreso estas vi.
- T**iusence ni profitas la momenton por same danki kaj celebri nian mirindan idiomon kiu permesis interkonatiĝi kun “mirindaj frenezuloj”. Esperanto estas bona ilo por plibonigi la mondon (vere ĝi jam plibonigis nian mondon).
- O**rganizi eventon (bone) ne estas facila tasko. Tial anticipe ni pardonpetas pro organizaj misfaroj. Restas la konsolo pensi ke nur ne eraras kiu neniam faras.
- N**iaj lastaj vortoj estu dediĉitaj al la litero “N”, la finaĵo per kiu en Esperanto ni esprimas la akuzativon (la volon, la deziron...) kaj la direkton. Ke nia direkto estu la volo: “Kie estas volo tie estas vojo”. Profitu la okazon... kaj la verdan oazon...!

! ;-) **La KOK (Kongres-Organiza Komitato)**

Prezidanto: Eduardo Berdor

Vicprezidanto: Antonio Marco

Sekretario kaj kasisto: Lorenzo Noguero

Aliaj kunlaborantoj: Enrique Navarro, Sabino Pelegrín, Miguel Ángel Martín

Zaragoza, la kongresurbo

Antonio Marco Botella

La urbo Zaragoza devenas historie kaj urbe el romia kolonio fondita de la legioj de Aŭgusto je la 24-a jaro a. K. kun la nomo *Caesaraugusta*. Ĝi havis la normalan strukturon de la militistaj tendaroj, kaj estis konstituita sur teritorio proksima al rektangula formo.

La tuta urbo estis ĉirkaŭata de murego nur interrompita de kvar pordoj, kaj ĝi etendiĝis tra tio kio hodiaŭ estas Via Aŭgusta kaj strato Coso, do sekvis la romiaj modeloj.

Dum la muzulmana okupado (j. 711-1492) la urba perimetro de Zaragoza estis la sama ol tiu antaŭa, sed en la urbo, tiam nomata *Saraqusto*, kreiĝis kvartaloj kie loĝis la judaj kolektivoj kun la hebrea sinagogo, la maŭraro kiuj sin dediĉis al la agrikulturo, kaj en la centro, dum la tajfa regno (precipe dum la regado de al-Mundir), ĉar li deziris plibeligi la urbon, oni konstruis komfortajn kaj luksajn varmbanejojn, oni ampleksigis la ĉefmoskeon (situata kie nun estas la katedralo Seo) kiu estis fondita de la honorinda Hanaŝ, situante la niĉon de la mihrabo ĝustaloke en la direkto al Mekko, kie oni faris la ritajn preĝojn; kaj ankaŭ oni konstruis en la centro la domojn de la plej riĉaj, kaj publikajn servojn... Konkrete *Saraqusto* fariĝis la plej granda tajfo de Al-Andalus, kaj centro de intelektuloj, kie sciencistoj regantaj matematikoj, astronomio, filozofio, poezio k. a. estis meritoplene konsultitaj de eŭropanoj kiuj speciale venis por informiĝi pri tiuj scioj.

En la jaro 1118 la kristanaj trupoj konkeris Zaragozon, kaj tio signifis la ampleksigon de la urbo: dum la XII-a jarcento venas la unua ampleksigo tra la nordorienta pordo, kie okazis la merkaton, kiuj kreis la kvartalon de San Pablo kaj sekve tiuj de San Agustin kaj San Miguel. En la XV-a jarcento formiĝis la kvartalo Arrabal ekster la muregoj kaj al la alia flanko de la "Puente de Piedra" (antaŭe al tiu ponto estis ankaŭ aliaj). La demografia premo devigis la aŭtoritatojn konstrui alian muregon pli suden de la romia, koincidanta kun la nuna Paseo de Maria Agustin: tiu mezepoka murego atingis je oriento kun la rivero Huerva kaj okcidente ĝis la pordo Sanĉo, sed inter la romia murego kaj la mezepoka, ankoraŭ ekzistis bedaroj kaj senokupitaj spacoj, iom post iom okupitaj per dometoj laŭ kreskis la loĝantaro.

La milito kontraŭ la francoj nomata "Sieĝoj de Zaragoza" en la jaroj 1808-1809, detruis konsiderindan parton de Zaragoza, kiun post la milito oni rekonstruis iom post iom, inter aliaj, en la jaro 1815, "Paseo de la Independencia", laŭ simila stilo ol la strato Rivoli de Parizo. La mencio de ĉiuj monumentoj kiujn oni starigis en la urbo estus longa, sufiĉe longa.

La industria disvolviĝo de Zaragoza havis kiel sekvon dum la duona fina parto de la XIX-a jarcento, la konstruon de uzinoj en la zonoj de Cogullada kaj Malpica, laboristaj kvartaloj, ŝoseoj en pluraj direktoj, stacidomoj Arrabal kaj Portillo kaj aliaj gravaj konstruaĵoj, kiuj plibeligis la urbon, sen menciis la muzeojn, teatrojn, kulturajn centrojn ktp.

Esperanto en Aragono

Antonio Marco Botella

Pri E-Movado en Aragono ni devas mencii kiel unua grupo tiu de Albarracin, jaro 1903, nomata **"Grupo Esperantista Santa Maria de Albarracin"**, kies prezidanto estis José M^a Lozano.

En Zaragozo oni fondis la Esperantan Societon **"Frateco"** en la jaro 1908, fare de Agustin de Montagud, Emilio Gastón Ugarte kaj Rafael Benítez. Ankaŭ Esperanto-rondoj estis en Teruel sub prezido de Julio Belenguer, kaj en Huesca sub prezido de José Artigas.

Brila epoko pri la disvastigo de Esperanto en Zaragozo estis la jaroj tridekaj, kiam nia urbo registris la plej altan nombron de E-Societoj, kiuj estis, krom la du cititaj:

"Zaragozo Esperantista" en str. Heroismo,

49; **"Esperanto kaj Paco"** en str. Hernan

Cortés, 1, kiu eldonis 128.000 poŝtmarkojn

pro-pacajn; **"Esperanto Kultura Klubo"** en

str. Candalija, 7; **"Esperanta Laborista**

Grupo" en placo San Carlos, 3; **"Socialista**

Esperanta Grupo" en str. Estebanez, 2;

"Esperanta Fako ĉe Ateneo Popular" en

str. Virtud, 4; **"Esperanta Fako Ateneo**

Racionalista" en Camino Alcachoferas, 109; kaj aliaj esperantistaj fakoj en politikaj partioj.

Esperanto inundis Zaragozon!!



Zaragozo estis ankaŭ oficiala sidejo tutlanda de **"Hispana Esperanta Konfederacio"** sub prezido de José Oros, kaj **"Hispana Esperanto-Federacio"** sub prezido de M. Sancho Izquierdo.

La sidejo de "Frateco" kaj de "Fundación Esperanto ekde 1999 troviĝas en str. Cadena, 20. La aktualaj prezidantoj de "Frateco" kaj de "F. Esperanto" estas respektive Lorenzo Noguero kaj Antonio Marco. En 2008 inaŭguriĝis monumento al esperanto.



LINGVO KAJ SENTO

“En la mondon venis nova sento...”:

Jes, ja, nova sento kiu lingve ekflugis kaj flugas... La sento vivigis novan lingvon!

“Lingvo kaj sento”: jen trafa duopo esprimita de K. Kalocsay.

“Lingvo kaj sento”: jen sugesta bildo pri nia internacia esperanta idiomo.

“Lingvo kaj sento”: du vortoj, du fortoj au (eble) malfortoj de nia verda lingvo.

Esperanto ne estas unudimensia fenomeno sed almenaŭ dudimensia. Plurfoje mi tion pensis kaj sentis. Tiel, diversaj duopoj povas taŭgi por karakterizi nian esperantan lingvon: kapo kaj koro, realo kaj revo, korpo kaj animo (Leono Zamenhof), racio kaj emocio, logiko kaj frenezo, knabo kaj kajto (belege kantata de la muzikgrupo Kajto)... Krome, ŝajnas konvene omaĝi la numeron du. Foje indas proklami: “Jen du, jen ĝu’!!” (LN)

Memorindaj kaj (re)legindaj vortoj de Kálmán Kalocsay:

“Komence estis la sento”, tiel oni devus komenci la historion de Esperanto. Vi ja scias, ke la sento naskis la lingvon. Kaj ne la seka scienculo, sed la profundsenta artisto skulptis el la ŝtonamaso de skemoj la statuon de la lingvo, ĉizante kaj glatigante ĝin, ĝis fine, ĝi vive ekmovis sin, kiel iam al Pygmalion. Ĉi tiu artista mano kaj sentema koro faris, ke en Esperanto estas ne nur fleksebleco kaj harmonio, sed ankaŭ varma senpereco, dolĉa aromo, afabla humoro, ĉarma senpretendeco. La ceteraj projektoj sonas apud ĝi, kvazaŭ matematika formulo apud soneto.

Lingvo kaj sento, jen estas Esperanto. La lingvo vivas en sia literaturo, la sento parolas per poezio.

(K. K.: *Lingvo Stilo Formo*, p. 51 - 52)

Esperanto [...] bezonas helpemajn manojn kaj entuziasmajn korojn. Donacu do ilin al la lingvo, kiu, kreskinte al la semo de sento, volas produkti florojn de sento, kaj kies eblaĵoj, tra la harmonio de sento kaj esprimo, ideo kaj formo, deziras disbranĉiĝi por multkolora, fortika kaj nepereigebla vivo

(K. K.: *Lingvo Stilo Formo*, p. 76)

PROGRAMO

VENDREDE (3-a de majo)

10:30 NeSolena malfermo de la Kongreso

11:00 Prelego de Antonio Marco: “Komentoj pri Donkiĥoto kaj ĝia tradukinto”. Omaĝo al Fernando de Diego. Donacado de ekzemplero al ĉiu kongresano

12:30 Interkona mateno

16:30 Vizito al Aljafería (NOTO: antaŭe, eblos rendevui en hotelo por iri al “Aljafería” kune)

19:00 Muzika prelego de Eduardo Berdor: “La valsoj de Chopin, romantika ĉefverko”

21:00 Muzika spektaklo de SoloTronik (“Sala El Zorro”. Centro Comercial Independencia “El Caracol”. Adreso: Paseo Independencia, 24, local 79)

SABATE (4-a de majo)

10:30 Solena malfermo de la Kongreso

11:30 Prelego de Miguel Fernández: “Poezio: armilo ŝargita per futuro. Esperanta antologio de hispana poezio kontestema, engaĝiĝinta, socia kaj revolucia”

13:00 Prezento de ludkartaro de Abel Montagut: Ludkartoj de “Talismanoj” (3-a serio) pri “Mil kaj unu noktoj” kaj “Al-Andalus”

14:00 Oficiala bankedo

17:30 Prelego/ateliero de Jorge Camacho: “Esperanto kaj poezio”

18:45 Prelego de Antonio Valén: “Kalmo kaj malkalmo ĉe Kálmán Kalocsay”

20:00 Muzika prezento de jOmO (“Sala Creedence”. Adreso: Plaza San Lamberto, 3)

DIMANĈE (5-a de majo)

10:30 Prelego de Antonio Marco: “La poezi-difino”

11:30 Esperanto-Instruado. Ĉu ILEI en Hispanio?

12:00 Asembleo de HEF


13:30 Oficiala fermo

Ekzistos Libro-Servo kaj eventuale (en la sidejo de “Frateco”) E-kurso.

Ekspozicio pri Esperanto (paneloj de HEF) en biblioteko M^a Moliner (pl. S. Agustín)

PROGRAM-KONTRIBUANTOJ

ANTONIO MARCO BOTELLA



VIVO KAJ VERKOJ / LINGVO KAJ SENTO

Profunda "sento al la lingvo" Esperanto kiel homama idealo, estas kio decidigis al nia samideano Antonio Marco Botella lerni Esperanton en la jaro 1937 en sia naskiĝurbo Callosa de Segura (Alicante). Du jarojn poste li jam instruis la lingvon kiel ekzilito en la koncentrejoj de Alĝerio. Kiam en la jaro 1949 alvenis al Zaragozo, tion kion unue li faris estis gvidi Esperanto-kursojn kun rimarkinda sukceso inter la gejunuloj kiuj plenigis la ĉambrojn de nia sidejo en str. Santa Isabel. Kun evidenta inklino al la Literaturo kaj Historio, li publikigis artikolojn en eksterlandaj E-gazetoj kaj estas ofta preleganto en la Internacia Esperanto-Semajno kaj en la propra Aragona E-Societo "Frateco". Dum naŭ jaroj li estis ĉefredaktoro de "Boletin" kaj "Kajeroj el la Sudo", kaj kiel simpla redaktisto li daŭrigas tiun taskon. Li publikigis dekduon da libroj pri la historio de Esperanto en Hispanio kaj pri hispana-araba poezio. Antonio Marco Botella, jam 92-a jar-aĝa, ankoraŭ aktivas en la Esperanta Movado kaj nun kiel prezidanto de "Fundación Esperanto".

*Se feliĉon ni perceptas en Kosmo
ni strebu en la Ter' por tia idealo
difinita per Bono, Vero kaj Belo
kiuj plenplenas niaj aspir-imagoj!!*

(Antonio Marco Botella: *Pri la senfina Kosmo*)



VIVO KAJ E-AGADO

Mi estas 32-jara instruisto de la franca lingvo el Zaragozo. Mia plej frua kontakto kun Esperanto okazis kiam mi iel hazarde trovis dulingvan vortareton en librovendejo en mia tiama urbeto, kiam mi estis eble 14-jaraĝa. Mi jam scivolemis pri lingvoj kaj en la nebulo de mia menso, mi kredas memori esti leginta artikolon en la ĵurnalo *Heraldo de Aragón* kelkajn jarojn antaŭe. Mi nur foliumis tiun vortareton Sopena dum kelkaj tagoj kaj tuj forlasis la aferon. En tiu momento Interreton ankoraŭ ne inkludis en la komputiloj.

Kiam mi finis miajn mezlernejajn jarojn, mi iris studi Tradukadon al la urbo Soria. Tie mi lernis komparan lingvistikon, sed laŭ mi, Esperanton

oni neniam menciis. La definitivan paŝon signifis doktoriĝa lernofako, kiun mi sekvis en la urbo Soria. Ties titolo estis: "Esperanto: utopía o realidad". Temis pri plurmonata kurso pri la ideo de Esperanto. Lerni la lingvon ne estis deviga, sed tiu emo vekigis en mi. Mi verkis pri mia samLKKano Sabino Pelegrín kiel ekzemplo de esperantisto, ĉi-kaze aktiva leterkorespondanto, sed ne fama movadano.


Mi ĝis nun neniam verkis en Esperanto, sed esperas agadi tiusence en la estonteco, komponante kantojn aŭ verkante malgrandajn rakontojn. Momente mi preferas traduki kaj helpi: mi kunlaboris en la tradukadon de la retejo *polyglot-learn-language.com*, en aragona retejo pri edukado, kaj de tempo al tempo mi subtenas la gelernantojn ĉe retejoj por lerni lingvojn kiel *Livemocha*.

Laste (sed ne balaste) mi estas voĉdonanto en HEF kaj vicprezidanto de "Frateco".

LINGVO KAJ SENTO

Unue, mi alvenis al Esperanto pro ĝia lingva specifeco. En tiu momento, mi ne konis aliajn planlingvojn kaj mi miris pro tio ke la elektoj de Zamenhof por konstrui novan lingvon estis, laŭ mi, tre bone elpensitaj. Iom post iom, Esperanto iĝis ankaŭ lingvo de sento, dum mi renkontis interesajn homojn kiuj scipovas ĝin, dum mi ekkonis ĝian movantan historion. Fine, plaĉas al mi povi paroli samnivele kun iu, uzante lingvon, kiun ambaŭ elektis libere kaj pasie.

SoloTronik



VIVO KAJ E-AGADO

Muzikisto, kantisto pri flamenko taranto stilo, frapado, iom da dancado laŭ cigana maniero el suda parto de Andaluzio, kun mikso da arabaj influoj, poemoj de Federiko García Lorca tradukitaj al esperanto per Antono Alonso (malnova prezidanto de HEF), io pri Lapenna, Kaloksay, kaj Morell, kun aranĝoj kaj adaptoj de mi mem. Surscene mi uzas spektaklon kaj miksadon inter videoj, laseroj, stroboj, efektoj, surprizoj, specialaj kaj "spacialaj" lumoj, frapado, dancado, ktp. Partoprenoj en 5 UKj, 1 JK, 5 IFj, 6 HEKj, ktp...

LINGVO KAJ SENTO

** E-o donis al mi eblecon koni aliajn personojn de aliaj landoj, kulturoj, ktp, kaj disvastigi mian muzikon.*

**Kiujn sentojn vekas en mi? Eo povas unuigi al ĉiuj el neutrala vidpunkto.*

**Lingva sento pri esperanto: Neutrala interkomprenado.*

**...fine de la vojaĝo ĉiam povas atendi al ni iu esperantisto en iu stacio de la mondo...*

**UZU ESPERANTON, UZU NEUTRALISMON, ESPERANTO NE KONAS LANDLIMOJN.*

La vorto "Solo" alvenas de la unua universala lingvo de la mondo: la Sanskrita kaj signifas soleco en la spaco, kiam ekzistis neniu materijaj aferoj... kaj interne de ĝi aperis ĉiuj aferoj, kiam la frukto komencis aperi kaj formiĝi, komencis aperi la diversaj kanaloj por konstrui ĉiujn mondojn, aero, lumo, akvo, tero, ktp. Solo povas signifi ankaŭ ke mi estas sola ludante esperantan muzikon, Solo de instrumento, sola-kafo...

Solo estas humila persono kiu intencas esprimi ideojn kaj la ideojn de aliaj kiuj ekzistis antaŭ ol mi, mi uzas la universalan lingvon kiu estas muziko ĉar dank' al ĝi ni ĉiuj homoj povas interparoli, interkomuniki ĉiujn ideojn.

(Solo: Ili estas nur kanzonoj)

MIGUEL FERNÁNDEZ



VIVO KAJ VERKOJ

Miguel Fernández naskiĝis en 1950 en Granado. En 1968 li transloĝiĝis en Madridon kaj ekstudis en ties Politeknika Universitato. Iniciatinto de la Lirikaj Festoj de HEF, kunfondinto de la Ibera Skolo aŭ Ibera Grupo de E-verkistoj. Verkoj: poemkolektoj *Ampoemaro* (aperinta kadre de *Ibere libere*) kaj *El miaj sonoraj soloj*; rakontoj en *Ekstremoj*; esearo *Sur la spuroj de Federico García Lorca*; tradukoj *Sanga nupto* kaj *La domo de Bernarda Alba*, de Federico García Lorca, *Ĝis tagmezo alvenos*, de Ignacio Aldecoa kaj *Miguel Hernández, poeto de l' popolo*, komentita antologio de poemoj de Miguel Hernández. Baldaŭ aperonta: *Poezio: armilo ŝargita per futuro* (komentita esperanta antologio de hispana poezio kontestema, engaĝiĝinta, socia kaj revolucia).

LINGVO KAJ SENTO

Miakore esperanto estas eĥo el pasintaj bataloj por la emancipiĝo de la subprematoj, unu plia el la ĉifonoj, ve, de la utopio. Mi amas plu la utopion kaj ties ĉifonojn. Esperanto estas ankaŭ vehiklo de sentoj. Mi verkas, ĉar mi volas pentri, skulpti, bildigi sentojn. Proprajn kaj aliulajn. Ja mi povus tion praktiki en mia gepatra lingvo, la hispana, sed en ĝi ĉio plej bela estas jam dirita, nur genioj kapablus krei ion vere novan; en esperanto – esprim-arbaro kun abundaj regionoj ankoraŭ virgaj, netretitaj, nesuspektataj, kun ankoraŭ modleblaj materialoj– negeniaj beletr-amantoj kiel mi povas plu esplori la manieron diri ĉion plej belan ĉiutage.

ABEL MONTAGUT



VIVO KAJ VERKOJ

Abel Montagut i Masip (Llardecans, 1953) licenciĝis pri kataluna filologio en Studi General de Lleida (Barcelona Universitato).

Li publikigis, originale en esperanto, la librojn *Poemo de Utnoa*, *Karnavale* kaj *La enigmo de l' araneo*; kaj traduke, *Amkantoj. 60 poemo* de Ausias Marc.

LINGVO KAJ SENTO

"Sed oni devas amigi justecon, universalan komunan justecon, kontraŭ egoista... Nura pensado malmulte efikas, ĝis kiam ĝi animiĝis. Homo kaj homaro agadas pli laŭ sentado ol laŭ pensado".

(Delfí Dalmau: *Dialekto, dialektiko*, 1955, paĝo 59)

Ho, jen vi havas en la manoj, kara sinjoro don Quijote, mia preferata traduko de viaj nesupereblaj hidalgaĵoj. Ĝi estas en la universala lingvo de la scioplena kaj laŭdire juda magiisto Semenufo, kiun li ellaboris specife por la ensorĉitoj de nia subtera mondo. Tre malfacilus la interkompreniĝo se mankus tia lingvo [...] Dum nia antaŭa vivo ni uzis interpretistojn, sed ĉi tie ni ne bezonas ilin [...]

- Mirinde [...] oni interkompreniĝas kun alinacianoj. Tio ŝajnas kaj estas la pentekosta miraklo de la lingvoj, ĉar neniam mi estus diveninta ke mi ne parolas nun en mia propra [...]

(Abel Montagut: *Don Kiĥoto eksterlande*", en *Karnavale*)

JORGE CAMACHO



Jorge Camacho (Hispanujo, 1966). Ĉefaj verkoj: eseoj *La liturgio de l' foiro*; rakontoj en *Sur la linio* kaj *Ekstremoj*, prozaĵo *La ĉapo de la sterko-vermo*, novelo *La Majstro kaj Martinelli*; poemoj *Celakantoj*, *Saturno*, *Eklipsas*, *Koploj kaj filandroj*, *La silika hakilo* kaj *En la profundo* (2013). Tradukis *Letero el Palestino* de Santiago Alba, poemojn de Ángel González en *Astura bukedo*, novelojn kaj poemojn de Jorge Luis Borges en *La sekreta miraklo*. Ĉefredaktas la literaturan revuon *Beletra Almanako*.

lingvo universala

*ĉiuj homoj komprenas
aŭ kompreni povas
la universalan lingvon de klasika gitaro
ludanta lertajn variaciojn*

*la universalan lingvon de peniktuŝo
sunlume
blanka
sur ole-pentrita vitro*

*la lingvon universalan de rizplado
spice komponitan
de talenta kuiristo*

*la lingvon sorĉe entenatan
en glas'
da ruĝa vino*

*ĝis abrupte sin trudaĉas vortoj krude
dialektaj*

*je ŝajno, je potenco, je ŝiro, je perfido
(El la poemaro *En la profundo*, 2013)*

ANTONIO VALÉN



Mi naskiĝis en Soria en 1965. Loĝis ankaŭ en Zaragozo kaj nun en Vigo. Profesie mi estas lingvisto kaj instruas la hispanan kaj la francan en galega mezlernejo. Mi okupiĝas pri esperanto de 1983, kiam mi hazarde vidis hispanan-esperantan vortareton ĉe geamikoj.

Mi verkis enkondukon por la romano *Tirano Banderas* de Valle-Inclán, en traduko de Fernando de Diego, kaj prezenton al la poemaro *El la sonoraj soloj*, de Miguel Fernández. Mi estas konata ankaŭ pro miaj multaj recenzoj en diversaj e-revuoj. En la hispana mi verkis informilon *El esperanto: lengua y cultura*, kiu detale prezentas esperanton lingvistike, beletre, kulture kaj historie pere de abundaj datenoj kaj komparoj.

Mian plej oftan okupon dum multaj jaroj konsistigis la konstanta reviziado de alies tekstoj en esperanto. En 2006 mi decidis ne plu revizii ion ajn pro laciĝo kaj tempomanko. Foje mi verkis mem poemojn kaj faris beletrajn traduketojn. Sed mia ĉefa laboro estis la reviziado kaj kompletigo de la *Granda vortaro hispana-esperanta* de Fernando de Diego, kiun li finis en 1994. Jam en 1991, li petis mian helpon, kaj de tiam ni kunlaboradis kune kun Miguel Fernández, Liven Dek kaj Jorge Camacho, ĝis la eldono de la verkego en 2003.

En la kongreso de Zaragozo, ŝatata urbo kie mi pasigis 14 jarojn de mia vivo, mi prelegos pri "Kalmo kaj malkalmo ĉe Kálmán Kalocsay", laŭ titolo sugestita de Lorenzo Noguero, prezidanto de la aragona E-klubo Frateco.

*Ho, jen vi Esperanto! Ne glora kaj fiera
Nur orfa, senpotenca, senforta, senmatura,
Svenema kaj senhelpa kaj -eble- senespera,
Sed nobla, blanka, klara kaj senmakule pura.*

(K. K.: *Streĉita kordo: Amara horo*)

*Eble ĉi-nokte murmuroj sufloros
-dum kuntuŝo haŭta, dum kareso kerna-
pri la disiĝ' morgaŭa sen kiso kaj sen larmoj.
Sed ne jam ni suferu, nur eklernu*

(Antonio Valén: *Ama fer' iama*)

jOmO



VIVO


JoMo / jOmO (Jean-Marc Leclercq) naskiĝinta en 1961 kaj loĝanta en Tuluzo (Okcitanio/Francio) komencis muziki en la jaro 1977 kaj ekesperantiĝis en 1988.

Tute nature li do decidis kanti kaj verki en la lingvo internacia. Li surpiedigis sian propran tiaman grupon, La Rozmariaj Beboj, kiu ekfamiĝis komence de la jaroj 90 en la franca alternativa rok-medio. La bando turneis en diversaj landoj (el kiuj Ĉinio), produkis du albumojn, kaj eĉ koncertis sur la prestiĝa pariza scenejo Olympia. Post disiĝo de la Beboj, JoMo kreis novan grupon, Liberecanoj, kun kiu li surbendigis ĉe Vinilkosmo kaj kreis unuan rekordon de multlingva koncerto (22 kantoj en 22 lingvoj), kiu aperis en 2000 en la libro Guinness. Poste kaj sole, li surbendigis tutan esperantan albumon titolitan **JoMo friponas!**, kiu aperis fine de 2001. Sekva disko, **jOmO slavumas**, aperis printempe de 2006 kun multaj muzikistoj slavstilaj. Li daŭre koncertas esperante kaj multlingve, sola kun gitaro, kantante ĝojajn kaj dancigajn kantojn.

LINGVO KAJ SENTO

Malsame de ĉiuj la aliaj lingvoj, kiujn mi lernis ĝis tiam, ekkonante esperanton mi renkontis nekredeblan reton de mildaj frenezuloj, kies ĉefa celo en vivo estas renkonti la ceterulojn de la tuta mondo. Estis kompreneble la plej interesa pozitiva ŝoko de mia vivo. Tuj vojaĝoj komencis: Germanio (legenda IS!), Nederlando (IjoKo), Ĉeĥoslovakio (Ostravo) ktp... kiel plej ebriiga kirlovento de internacia amikeco. De lingvo, esperanto iĝis por mi vivarto. Internacian amikecon sekvis internacia amo, kiu ankoraŭ plifortigis miajn ligojn kun la malsaĝa ideo de Doktoro Zam kaj enradikigis ĝin en mia vivo. Kiel kantisto, mi tuj post komenco de la lernado de esperanto ekis traduki aŭ komponi tekstojn de kanzonoj. Mi rapide malkovris la nekredeblan facilecon kaj flekseblecon de la lingvo en poezia kampo, kiu permesas esprimi plej komplete la sentojn, faktojn, situaciojn, ktp... Kiel artisto oni ankaŭ rapide min invitis en diversaj aranĝoj en diversaj landoj, kun grupo aŭ sola, kaj mia horizonto nekredeble tuj plilarĝiĝis tiel, kiel mi pli frue eĉ supozis ne povis. Nun mia jaro estas ritmita per aleksterlandaj vojaĝoj. (...) Esperanto helpas min kompreni la mondon kaj mi varme kaj kore dankas ĝin.

MAPO (centro de Zaragoza)



REFERENCOJ DE LOKOJ INDIKITAJ SUR MAPO

1 **KONGRESEJO: Hotelo Goya**

Adreso: Calle 5 de marzo, 5

Tfno.: 976 22 93 31.

ttt-paĝo: <http://www.palafoxhoteles.com/hotel-goya>

Programeroj: Ĉiuj krom tiuj indikitaj aparte sekve.

2 **Palaco “Aljafería”**

Adreso: Calle de los diputados, s/n

Tfno.: 976 28 96 85.

Programero: Vizito de grupo. Vendrede, 16:30 (NOTO: antaŭe, eblos rendezui en hotelo por iri al “Aljafería” kune)

3 **“Sala El Zorro”**

Adreso: Centro Comercial Independencia (“El Caracol”). Independencia, 24

Tfno.: 651 661 889.

Programero: Muzika spektaklo de “SoloTronik”. Vendrede, 21:00

4 **“Sala Creedence”**

Adreso: Plaza San Lamberto

Tfno.: 976 94 67 07 / 635 689 880

Programero: Koncerto de jOmO. Sabate, 20:00

5 **Sidejo de “FRATECO” kaj “FUNDACIÓN ESPERANTO”**

Adreso: Calle Cadena, 20, 1^o, izda.

ttt-paĝo: <https://sites.google.com/site/fratecoesperanto/>

Kontakto-telefono: 658 106 046

Programero: Eventuale: Enkonduka kurseto pri Esperanto

VIZITINDAJ LOKOJ



Vizitindaj artaj lokoj:

Famaj lokoj: Baziliko "El Pilar", katedralo "La Seo", palaco "Aljafería"...

Muzeoj: "Museo Provincial de Bellas Artes de Zaragoza": placo Los Sitios, 6.

"Museo Camon Aznar" str. Espoz y Mina, 23.

"Museo Pablo Gargallo": placo S. Felipe, 3.

Muzeoj kaj teatro de la romia epoko: diversaj.

Aliaj lokoj vizitindaj:

Rivero Ebro kaj diversaj pontoj.

Parko "Parque Grande" oficiale nomata "José Antonio Labordeta".

Parko "Parque del Agua" (kie okazis internacia ekspozicio pri akvo "Expo 2008").

"Rozario el kristalo" (procesi-figuroj de la "Sankta Semajno"): pl. S. Pedro Nolasco.

Skulpturo "Paro sub ombrelo": "Paseo de la Constitución" (proksime de pl. Paraíso).

Monumento al Esperanto (en "Glorieta del Esperanto", malantaŭ Hotel Boston).




Aliaj sugestoj (dum la tagoj de la Kongreso): En "Centro de Historias" (placo S. Agustín):

Ekspozicio de paperfaldado "origami"

Ekspozicio pri 100 jaroj de skoltistoj ("scouts") en Aragono

Vizito al la palaco Aljaferio

Antonio Marco Botella



Tiu ĉi palaco datas de la duono de la XI-a jarcento, kaj estas unu el la malmultaj kiun oni konservas relative kompleta de la arkitekturo hispana-muzulmana, kaj ĝi estis konstruita sub ordono de la dua monarĥo de la Zaragoza Tajfo, Abu Jafar Ahmed al-Muqtadir Billäh, kiu regis la tajfon de la jaro 1046 ĝis 1082, la plej longa regado de ĉiuj tajforeĝoj de Al-Andalus. Oni ĝin konstruis kiel distra vilao aŭ "amuza domo" kaj oni nomis ĝin *al-Ya'fariyya* (Aljaferio) aŭ *Qasr Där al Surür* (palaco de la Ĝojo), ĉe kies belaj salonoj okazis la oftaj festoj de la regno, kaj kie la grandaj poetoj, kiujn al-Muqtadir malavare protektis, verkis kaj recitis la plej bonajn poemojn.

Tiu reĝo, al-Muqtadir, amis la sciencon kaj poezion, kaj la historiisto al-Saqundi (naskiĝinta en 1231) diras en sia verko "**La hispana islamo**": "Vi havas reĝon, al-Muqtadir, sinjoro de Saraqusto, vere mirinda saĝulo pri astronomio, filozofio, geometrio kaj poezio". Efektive, elstara matematikisto, li verkis ankaŭ belajn poemojn, kaj al la palaco Aljaferio, kiun li ordonis konstrui li dediĉis jenajn versojn:

Al la palaco Aljaferio

Ho, plezurpalac' de Ĝojo!
Ho, salon' el or' kaj brilo!
Mia cel' en vi kroniĝis,
fakt' el miaj iluzioj.

Se en mia tuta regno
mi ne havus ja alion,
certe restus mi kontenta,
ĉar en la profunda mio
estas tiu alkazaro:
mia plej ĝojig-atingo.

Post longa regado (34 jaroj) forpasis al-Muqtadir kaj okupis la tronon de Saraqusto sia filo al-Mutamin, homo kun profunda inklino al studado, vera intelektulo, pri kiu oni scias ke li estis elstara matematikisto kaj poeto. Oni ankaŭ scias ke li multe amis celebri dumnoktajn festojn sur la rivero Ebro, kaj la kronisto Fath ibn Jaqän rakontas unu el ili:

"La ŝipeton de la princo ĉirkaŭis multnombraj barkoj; la melodioj de la kordinstrumentoj (precipe liutoj) estis tiel belaj, ke la navigantoj sin sentis devigataj halti por ĝui la magion de tiuj sorĉaj muzikoj kaj ofte mutiĝis ĉar krom la muziko ofte oni recitis belajn versojn, kiel tiuj kiuj priskribas Ibn Hasdäy:

Ho, mirinda bela tago!
kiom brila je tagmezo,
ĝi sin montris vivkolora
per la oro kaj arĝento
fororbitaj de tagiĝo
kaj de sun-radi' vespero!
Oni dirus ke indulge,
nun denove la vetero
nin deziras rekompenci
post ventego kaj tempesto.

Sur la barko princ' Mutamin
ĝuas navigante river' Ebron!

La poemoj kaj la historio de la reĝoj de Saraqusta estas tre, tre allogaj, sed ni devas daŭrigi la historion pri la palaco Aljaferio.

Post la konkero de Zaragozo de Alfonso la 1-a en la jaro 1118, la Aljaferia palaco restis kiel sidejo de la kristanaj monarĥoj, kiuj ofte remodeligis kaj ampleksigis ĝin supermetante novan etaĝon sur la muzulmana konstruaĵo. La plej gravaj konstruoj estis tiu sub regado de Pedro la IV-a dum la XIV-a jarcento, kaj precipe tiu de la Katolikaj Reĝoj je la fino de la XV-a. Ankaŭ dum tiu kristana epoko, la Aljaferio estis scenejo de multnombraj festoj kaj celebradoj, kaj post tiu hela epoko ĝi estis sidejo de la Inkvizitora Tribunalo, kiu okupis la palacon ĝis 1706.

Malsupre kaj, maldekstre, oni konstruis kaj nun funkcias la Aragonan Parlamenton.

Post multaj jaroj de forlaso, la Belarta Ĝenerala Direkcio de nia lando komencis ripari kaj restarigi la palacon Aljaferio, kaj tiel estis kiel iom post iom reaperis la belegajn profilojn de tiu bela muzulmana palaco: Nun oni povas eniri tra pordo hufofero formo, kalifa tipo, inter du murkuboj. La unuan lokon kiun la vizitanto trovas estas la tiel nomita korto San Martin, dekstre, kun la preĝejo kies nomo ĝin donas, verko de la XIV-a jarcento. Ekde tiu ĉi korto, apud la enirmuro, oni eniras en la tiel nomitan korton de Sankta Isabel tra pordo triarka, tre ornamita. Estas tiu ĉi la centra korto de la muzulmana palaco. Antaŭe estis ornamita de du basenoj kaj ĝardenoj. Ĉe la suda portiko –maldekstre de la aktuala korteniro- oni starigas nun la belegajn arkojn plurlobajn kovritajn de riĉega dekoracio.

Ĉe la norda portiko, estas videblaj la plej granda parto de la salonoj. Unue "la granda salono", enmarkita de grandaj plurlobaj arkoj kun belegaj kapitejoj tajlitaj en alabastro laŭ stilo el korinta kapitejo. Komunikas tiu ĉi al hejm-kapelo, ne ĝuste nomita moskeo. Oni eniras ĝin tra pordo de hufferaforma arko, enmarkita en ornama profilo, kun abunda dekoracio interne de la arko, kaj ĉirkaŭ ĝi, farita per speciala gipso ĉizita. Interne, la hejmkapelo estas oktagonforma. Malsupre estas ornamita tre abunde per miksliniaj arketoj, escepte tiu parto kiu korespondas al la eniro kaj al "mihrab", aŭ niĉo orientigita al la Mekko. La "mihrab" estas ornamita kaj la arko kiu ĝin enmarkas estas laŭ kordova tipo.

La dua etaĝo estas konstituita de malgranda tribunon kun mudeharaj pentraĵoj de la XIII-a jarcento kaj ĝi estas kovrita de moderna volbo kun krucigitaj arkoj. La kapitejoj estas laŭ kordova tipo. Ekde "la granda salono" kaj tra malgranda korto kun miksliniaj arkoj, oni alvenas en la marmoran salanon, tiel nomita pro la platŝtonoj kiuj kovris la plankon. La dekoracio estas situata sur la supera parto de ties muroj, kun diversaj motivoj, precipe arketoj kaj ornamoj gipse ĉizitaj.

Tra malgranda korto oni alvenas en la ĉefturon de la Trobadoro, kie Garcia Gutierrez disvolvis parton de la agado de sia dramo sur kiu estis bazita la la opero de Verdi. Estis la omaĝa turo, kaj kvankam ĝia konstruo devenas de la IX-a jarcento, oni surmetis novajn etaĝojn dum certa tempo, kiu iras de la XI-a ĝis la XIV-a jarcento.

Ankaŭ ekde la "granda salono" oni povas pasi al la salonoj de la Katolikaj Reĝoj. La ampleksa "ceremonia ŝtuparo" kovrita de plafono tempere pentrita, kun emblemoj de la Reĝoj: jugo kaj sagoj kaj la lemo "Tiel rangas", prezentas verandon gipse ĉizita kun gotikaj motivoj, tute same kiel la dekoracioj de la grandaj fenestroj kiuj lumigas ilin. La palaco, en sia strikta senco, konsistas esence pri galerio, ĉe kies fenestroj kaj pordoj pretigas la iradon al la "oromita salono" aŭ tronsalono, kaj ankaŭ al la salonoj nomitaj "de la perdiĝintaj paŝoj". La fundamenta ĉambro estas la tronsalono, ampleksega salono rektangula superkovrita de belega kaj okulfrapa mudehara plafono, konsistanta el du partoj: belega verando sub kie etendiĝas skribo kiu citas la reĝojn kaj siajn titolojn, kaj la daton kiam tiu salono estis finkonstruita: jaro 1492. Super tiu ĉi galerio komenciĝas la belega kasonplafono ornamita de elementoj gotikaj kaj mudeharaj. Je la fino de tiu alo, kaj ĉirkaŭante la tronsalanon, estas la tri salonoj de la "perdiĝintaj paŝoj", kovritaj de belaj lignaj ornamoj kun elementoj gotikaj kaj mudeharaj.

“La Seo de San Salvador”

Antonio Marco Botella



Tiu ĉi katedralo estis konstruita sur sama loko kie estis la plej granda moskeo de Sarakusto dum la okupado de Iberio, ĝi estis konsekrita de la episkopo S-ro Pedro Librana en la jaro 1119, unu jaron post la konkero de Zaragozo fare de Alfonso la I-a.

Baldaŭ oni pensis konstrui novan templon, kiu estis komencata ĉe la fino de la sama jarcento XII-a, laŭ la unua eŭropa stilo, la romanika. De tiu preĝejo oni konservas la malsupran parton de la absido, kun elegantaj fenestroj bele dekoraciitaj ekstere, kaj interne riĉa skulptarta dekoracio, eltrovita malantaŭ la ĉefretablo de la templo.

Je la komenco de la XIV-a jarcento kaj post la falo de parto de la romanika preĝejo, oni konstruis alian laŭ la nova modostilo, tio estas la gotika. Ĝia strukturo konsistis el tri navoj, pli mallongaj ol nuntempe, kaj kapeloj inter abutmentoj.

Kiam oni levis la kupolbazon, estis papo en Avignon, Pedro de Luna, kiu malavare kontribuis al la konstruado de la katedralo (kie li antaŭe estis kanoniko). La kupolo konstruita de mudeharaj masonistoj havis tiaro-formon, por evidentigi ĝian patronigon.

Kelkajn jarojn poste, la aŭdaca strukturo estis konsiderata en ruino-stato, kaj la ĉefepiskopo Alonso de Aragón, ĉe la sojlo de la XVI-a jarcento, decidis rekonstrui ĝin. La nova kupolo finita en la jaro 1520 kaj realigita de kristanaj kaj mudeharaj artistoj, estas orangule bazita, kaj fariĝas oktogona pere de kvar trumpoj; ĝi estas kovrita per stelornamita volbo de krucitaj arkoj, kun riĉa dekoracio de rozo-formaj tajlajoj, sur orumita ligno.

Ĉe la malsupra parto ekzistas niĉoj inter pilastroj de renesanca karaktero. La tutaro estas sintezo de stiloj gotika, platereska kaj mudehara, kiu pompas, precipe, ekstere. Estis ampleksigo de la templo je la fino de la XV-a jarcento, aldonante koncernajn navojn ĉiuflanke, kaj poste plilongigis ilin longitude, krom unuigi la internan parton. La kvin navoj estas kovritaj de transepta volbo, kaj ili per sia simpleco aŭ komplikado spegulas la diversajn fazojn de sia konstruado.

La ĥorejo, situata meze de la preĝejo laŭ la hispana kutimo, enhavas gotikan seĝaron de la XV-a jarcento, fabrikita de la prestiĝaj fratoj Gomar. En la XVI-a jarcento oni ĝin ĉirkaŭis per muro kovrita de tajlita dekoracio, sur malmoligita gipso de platereska karaktero.

Nuntempe, pro plifirmigaj laboroj, kiuj nur permesas viziti la kapekstremon de la preĝejo ĝis la ĥorejo, oni translokigis al unu el la altaroj, apudflanke de la Ĉefa, tiun de Sankta Petro kaj Sankta Paŭlo.

Speciale grava estas la grandioza kaj monumenta gotika retablo, komencata en la jaro 1445 de P. J. de Vallfogona, aŭtoro de arta murkolekto kun reliefoj de la vivo de Sankta Valero, alternante kun niĉoj de vegetala dekoracio, destinitaj por surmeti arĝentajn bustojn. Sur ĝi oni levigis la retablo-korpon, kiu estas aranĝita triptikoforme kun tri scenoj: la Transfiguro, la Epifanio kaj la Ascensio de la Sinjoro, verko de la germana skulptisto Hans de Suabia. Oni kovras ilin per sveltaj dekoraciplenaj baldakenoj kun figuretoj, kaj enkadriĝas per protektilo riĉe dekoraciita de vegetalaj motivoj kaj anĝelaj figuroj.

Inter la kapeloj kiuj distribuiĝas laŭlonge de la preĝeja perimetro, la plej antikva estas tiu de Sankta Mikaelo, konata kiel la paroĥeto, kies konstruo estis ordonita de la ĉefepiskopo Lope Fernandez de Luna en 1360. En la kromaj kapeloj kiuj ofertas reprezentecan elmontron de la aragona arto, ekde la XVI-a al XVIII-a jarcento elstaras du grandiozaj ensembloj, tiu platereska de Sankta Bernardo fondita de Hernando de Aragono. Ankaŭ estas interesa la kapelo de la Blanka Virgulino, maldekstre de la ĉefkapelo, kun pentrita retablo, verko de la borgonja skulptisto Johano Dusi.

Estas enkalkulita ankaŭ al tiu katedralo, du muzeoj, unu la kanonika kapitula, kun eksterordinara ensemblo de oraĵarto inter aliaj objektoj. La alia, muzeo de tapiŝoj, kun unu el la plej bonaj hispanaj kolektoj de gotikaj tapiŝoj.



RELEGINDE

*Se ridas luno gaja
radias suno maja,
pleniĝu via koro
de lunarĝent', sonoro...*

*Se Vivo manifestas,
sopirojn Ĝi sugestas,
kuraĝu songi, ardi
en revoj volon hardi...*

*Kaj poste malavare
Disĵetu ĉion are,
Ĉar ĝojo de l' Feliĉo:
Disipi el la riĉo.*

AL SIAJ GEAMIKOJ

JULIO BAGHY

(el: *La Teatra Korbo*)

OMAĜO EN ODA KLEO AL FERNANDO DE DIEGO

*Ĉar ido de l' aer', vi ne forestas.
La vento, via frato, mil flugilojn
el lun-arĝent' kaj magmo
enblovis viaviven. Kaj manaas
ĉe vi plej vigla via voĉo plue.
depost ol vi kolumbis, ĝi kolombas
de la Kariba Mar' al Mare Nostrum,
de Orinok' al Ebro,
depalme oliv-arben,
portante orkideajn
sopirojn pri diantoj.
Pere de ĝi kresĉende l' kosmon trafas
la kri' de Hispani' kaj Ameriko.*

*Ido de l' ter', vi donis vin vortnutre
niadezerte. Cent horloĝoj ŝrumpis
sursable, de tineoj forskuite
el siaj velke krakaj lirikbranĉoj.
Kaj sprosis vi kaj ŝprucis kaj oazis,
spitante la samumon
el nia verda mondo ĉiam preta
saturni sian pleje freŝan limfon.*

*Ido de l' akvo, hule, plaŭde, ŝaŭme
vi tajlas parolkonkojn. Puntas dirojn.
Pedante? Ne. Torento? Vivtakte!
Tra via plumo fontas
vi mem sen artifiko.
El via plumo lirlas
prurdimensia belo, ho amanto
de la kolor', sonor', sapor' de l' vortoj!
Ido de l' fajro, ĉendu plu la nokton.
Ĉendu plu nunajn flamojn kaj novaajn.
Ĉendu plu sunojn estingitajn, ĉendu
sparkojn sen ĉes', sed surdu al l' absurda
kvakad' en nia marĉo,
kie kvar ranoj stelojn sentripigas
por fari al si strasajn kolierojn.*

*Plu ĉendu l' nokton, forĝu la profilon
de la sakrala taŭr' de l' verda belo.
Brulstamu l' felon de ĉi opa sonĝo
per via fer', Fernando, ruĝe arda
eĉ en la sin' de via nomo, ido
ne de minora di' sed de diego.*

Miguel Fernández: *El miaj sonoraj soloj (El la sonoraj soloj)*. IEM. Vieno, 1996

Edmond PRIVAT: Esprimo de sentoj en Esperanto

Ekzistas diversaj rimedoj uzataj (plej ofte senkonscie) por esprimi sentojn. Nu, tiuj samaj rimedoj povus esti ankaŭ uzataj por esprimi logikan ideon. Fakte ĉiu ajn lingva rimedo povas servi al unu aŭ la alia kaj plej ofte al ambaŭ samtempe. Ekzemple:

1-e: Sona plilaŭtigo de iu aŭ alia frazero.

Jen senkolora frazo: *"Li venis je la oka"*. Diru nun kun forta akcento: *"Je la oka li venis"* (ne je la naŭa). Tiu plilaŭtigo certe montras logikan distingon kaj insiston pri akurata fakto. Se vi diras nun *"Je la oka? Vi frenezas. Mi bezonas ripozi dimanĉon matene"*, tiam vi sentas evidente kaj aŭdeble indignon, ke oni kuraĝas proponi al vi tiel frumatenan inviton aŭ ordonon. Tie estas ne nur plilaŭtigo, sed vere alitonigo, kiu transformas la frazon kvazaŭ en demandon, duone indignan, duone mokan.

2-e: ŝanĝo en la ordo de la frazo.

Se vi diras *"Vi aĉetu tian skatolon, ne alispecan"*, la plilaŭti-go jam efikas. Tamen, same kiel en la ĉi supra ekzemplo, ia ŝanĝo de la ordo en la frazo ankoraŭ pli impresas: *"Tian skatolon vi aĉetu, ne alispecan"*. Tie temas certe pri teknika ordono, do insisto kun senco ĉefe logika. Sed se vi, reveninte, aŭdas la komisianton ekkrii *"Tian skatolon vi kuraĝis aĉeti!"*, tiam certe vi tuj komprenas lian senton pri miro kaj malkontenteco, esprimitan per la frazaranĝo kaj plilaŭtigo samtempe.

3-e: Forigo aŭ ripeto de vortoj.

Ekzemple: *"Skatolon? Ne. Keston preferu!"* Jen kvazaŭ telefona interparolo. Ĉiuj verboj, pronomoj k.t.p. mankas. Tie la forigo de vortoj antaŭ ĉio helpas logikon. La celo estas precizigo teknika. Sed aŭdu alian telefonan interparolon: *"Min, prezidanto? Neniam!"* Tie la forigo de vortoj havas akre sentan signifon kaj vi tuj komprenas kun kia malplezuro la parolanto sin defendas kontraŭ nedezirata elekto.

4-e: Elektro inter ekzistantaj vortoj.

Elektu ekzemple la vortojn *paroli* kaj *bleki*. Jen tute logika uzo de ĝi: *"Homoj parolas, bestoj blekas"*. Tio estas scienca konstato. Se vi nun ekkrias en diskuto: *"Neeble interparoli! Vi nur blekas kaj insultas!"* Tiam certe la elekto de la vorto blekas havas malpli logikan intencon ol nereteneblan sentan signifon. Sub tiu ĉi kategorio vi povas ekzameni ĉiujn bildojn uzatajn en la lingvo. Ju pli nelogikaj, eĉ mallogikaj ili ŝajnas, des pli forta estas la sento esprimata. Esperanto elĉerpas siajn bildojn el tri ĉefaj fontoj: propraj-komunaj, propraj-personaj kaj eksteraj-tradukitaj. Tiu ĉi lasta klaso ekzistas en ĉiuj lingvoj, kiuj konstante pruntas unu al alia, ĉar la homoj havas ĉie similajn emojn. Do en Esperanto, kiel en plej multaj aliaj lingvoj, oni diras *"forta kiel leono"*, nomas malican knabon *"diabloton"* aŭ priskribas malbonan junulon kiel *"sentaŭgulon"*.

5-e: Kreo aŭ modifo de vortoj.

Jen riĉa produktado per vortkombinoj kaj ĉefe per prefiksoj kaj sufiksoj. Ilian uzon por logikaj celoj instruas ĉiu gramatiko. Se vin informas kompetentuloj, ke *"la fosistoj malkovris romanon vazegon malfacile transporteblan"*, vi ja ne aŭdus el la uzitaj sufiksoj ion alian ol pure logikan, sed se vi priskribas iun kiel *"Azenego! Neaŭskultebla ulo!"* vi certe montros nek admiran, nek ŝatan senton al tiu malplaĉanto kaj oni povos konstati, ke vi uzis la sufiksojn malpli logike ol subjektive.

Claude Piron:

MI KREDAS JE LA BONO. MI KREDAS JE ESPERANTO

Mi kredas je la Bono. Kaj, male al multaj homoj, mi kredas, ke Bono tute ne simetrias kun Malbono, sed ege superas ĝin. Malbone konstruita domo disfalas. Bone konstruita rezistas al la atakoj, eĉ plej teruraj, de naturaj fortoj. Tial mi havas neniun dubon pri la estonteco de Esperanto. Se oni komparas ĝin kun la aliaj rimedoj interpopole komunikiĝi, estas klare, ke ĝi estas la plej bona. Mi perceptas, ke Esperanto estas unu el la konkretiĝoj de la Bono.

Ekzistas tri sistemoj de internacia komunikiĝo: burokrata, ĝangala kaj demokratia. La burokrata sistemo estas tiu de la internaciaj organizaĵoj, kiel UNO au la Europa Unuiĝo. Kiel ĉiuj burokrataj sistemoj, ĝi uzas gigantajn kvantojn da papero, tempo, mono, elektro, homa energio por mizeraj rezultoj. Kaj ĉion ĉi pagas la impostpaganto.

La ĝangala sistemo estas tiu, en kiu unu lingvo, kaj sekve unu kulturo, unu nacio au grupo de nacioj, ricevas monopolan pozicion ne pro la propraj kvalitoj de la koncernaj lingvo au kulturo, sed sole pro politikaj, ekonomiaj kaj similspecaj faktoroj, kiuj neniel rilatas al la postuloj de lingva komunikiĝo kontentiga por ĉiuj. Tia estis la sistemo komunikiĝi per la franca en la dek-naŭa jarcento, tia estas la internacia uzo de la angla en la nuna. Tiu sistemo, kiu privilegias la anojn de unu kulturo, havas multajn fiajn efikojn, kiuj kreas en la mondo danĝerajn fuŝ-ekvilibrojn, se diri nenion pri la katastrofaj kulturaj konsekvencoj de tia lingva sintrudemo.

Kaj al la burokrata sistemo, kaj al la ĝangala mankas unu el la ĉefaj ingrediencoj de homa boneco, nome sento. Ili estas sensentaj sistemoj. Mankas al ili ĉefe kunsento, kompatato, sento pri justeco kaj komunika komforto, konsidero al la bezonoj de tiuj, kiuj estas etaj kaj malfortaj, sento pri homa digneco kaj pri la rajto de ĉiu renkonti iun, kiu aŭskultos kaj komprenos, iun, kun kiu eblos senprobleme komunikiĝi.

La tria sistemo estas la demokratia. Ĝi nomiĝas Esperanto. Kiel ĉio demokratia, ĝi havas multajn mankojn, multajn malperfektaĵojn. Sed ĝi, tamen, estas la plej justa, la plej efika, la socie kaj psike plej kontentiga sistemo. Unuvorte, ĝi estas bona. Ĝi naskiĝis el la boneco de unu homo. Ĝi naskiĝis el sento de kompatato, de solidareco, el postulo al justeco kaj homa digneco. Jes, ĝi estas bona. Kaj tial ĝi supervivos la aliajn.

Mi kredas je Esperanto. Mi kredas, ke tiu lingvo estas multe pli valora ol la plimulto el la esperantistoj konscias. Mi kredas, ke ĝi solvos multe pli da problemoj en la estonteco de la homaro, ol estas ĝenerale imagate, eĉ inter ni. Mi kredas, ke ĝi povas forigi multajn suferojn, pri kiuj homoj ne konscias, kaj kiuj estas ligitaj al la manko de interkomprenilo.

(C. Piron: *Kial kaj kiel lerni Esperanton*. Oomoto, 1995, N-ro 437, p. 22-24. Mallongigita)

KONGRESANOJ

(Listo datumita je la 25-a de aprilo)

K-n-ro	PERSONA NOMO	FAMILIA(J) NOMO(J)	URBO
1	ANTONIO	MARCO BOTELLA	Zaragoza
2	EDUARDO	BERDOR REMÓN	Zaragoza
3	EDUARDO	VARGAS	Málaga
4	MIGUEL	FERNÁNDEZ	Madrid
5	ABEL	MONTAGUT MASIP	Cervià De Les G
6	JORGE	CAMACHO	Madrid
7	ANTONIO	VALÉN FERNÁNDEZ	Vigo
8	JEAN MARC	LECLERCQ	Toulouse
9	JOSÉ ANTONIO DEL	BARRIO UNQUERA	Alcorcón
10	EDUARDO	LARROUY	Bilbao
11	SABINO	PELEGRÍN COLOMO	Ejea De Los Caballeros
12	ENRIQUE	NAVARRO RUBIO	Zaragoza
13	VLADIMIRO	PAJURKO	Pustomiti
14	JOSÉ ANTONIO	FLETA ZARAGOZANO	Zaragoza
15	MARIBEL	SORIANO MARCO	Zaragoza
16	ANTONIA	LAPUERTA PALACIOS	Zaragoza
17	M ^a FERNANDA	ONDÉ BERROYA	Zaragoza
18	ANA	HERNÁNDEZ LAPUERTA	Zaragoza
19	ÁNGEL	LÓPEZ ARMISEN	Zaragoza
20	EUNICE	ALBERTO MOYSÉS	Zaragoza
21	LORENZO	NOGUERO SARASA	Zaragoza
22	PILAR	ZARAGOZA CASAJÚS	Zaragoza
23	ANTONIO	NOGUERA JIMÉNEZ	Zaragoza
24	LUIS	SERRANO PÉREZ	Sabadell
25	RAFAELA	URUEÑA ÁLVAREZ	Valladolid
26	LUIS	HERNÁNDEZ GARCÍA	Valladolid
27	ANGELITA	SANZ MAYOR	Madrid
28	FÉLIX MANUEL	JIMÉNEZ LOBO	Madrid
29	ÁNGEL	MAÑERO GONZÁLEZ	Valencia
30	ANA	MANERO	Madrid
31	MANOLO	PARRA	Madrid
32	MIGUEL ÁNGEL	MARTÍN MARTÍN	Zaragoza
33	IRINA	GRIGORIEVA GRIGORIEVA	Santander
34	ÁNGEL	GARCÍA GUTIÉRREZ	Santander
35	PILAR	GAYARRE	Zaragoza
36	JESÚS MIGUEL	GARCÍA ITURRIOZ	Portugalete
37	ICIAR	ARTECHE URRUTIA	Bilbao
38	JOSÉ LUIS	BRINGAS TELLECHEA	Bilbao
39	CARLOS	SPINOLA	Málaga
40	J.	FARELL	
41	JOSÉ	AÑO BELDA	

42	JAIME	BENITO CEDO	Zaragoza
43	EMILIO	PÉREZ GIMENO	Zaragoza
44	ESPERANZA	LÓPEZ VILELLA	Zaragoza
45	JOSÉ LUIS	ORDÁS ARAGÓN	Zaragoza
46	JOSÉ VICENTE	GARCÉS PUYUELO	Zaragoza
47	ÁNGEL	ARQUILLOS LÓPEZ	Málaga
48	MARILO	TORRES MATEO	Málaga
49	ROSA	LÓPEZ MARTÍN	Terrassa
50	JUAN BAUTISTA	ARROYO GARCÍA	Zaragoza
51	PAULINO	MÉLIZ IRACHE	Monzón
52	ALBERTO	PÉREZ GIMENO	Zaragoza
53	FLORENCIO	SERRANO GIL	Roda De Bará
54	FRANCISCO	LÓPEZ LÓPEZ	Gautegiz-Arteaga
55	PABLO	CONESA GARCÍA	Zaragoza
56	ANA MARIA	MOLERA URGELLES	Moià
57	CARLOS	ILLA CASANOVA	Moià
58	JAVIER	GUERRERO GIMENO	
59	MATILDE	MONTERO SÁNCHEZ	Madrid
60	RAÚL	MARTÍNEZ ANGUIA	Ciudad Real
61	JULIE	CORSIN	Ciudad Real
62	PAULO	BRANCO	Bruselo
63	DIEMANTE	ANICIENE	Bruselo
64	ISABEL	SANCHO-ROUSSET	Barcelona
65	JESÚS	PÉREZ CABALLERO	Caseres
66	PAQUITA	CASADO	Caseres
67	M DOLORS	GODOY ROTLLENS	Cassà De La Selva
68	PATRICIO	ANTÓN LÓPEZ	Zaragoza
69	GUY	CAMY	Oloron-Sainte Marie
70	BICHON	BINET	Rébénacq
71	MARC	PLEYSIER	Rébénacq
72	BERNARD	MESLIN	Pau
73	GREGORIO	SOBRINO UTRILLA	Zaragoza
74	VÍCTOR	GARCÍA CANO	Alcázar De San Juan
75	ELENA	RUIZ LÓPEZ	Albacete
76	JESÚS	GARCÍA CANO	Albacete
77	PEDRO	GARROTE ESCRIBANO	Valladolid
78	SOLANGE	DUROU	Pau
79	JAIME	VINIELLES PEREDA	Madrid
80	MODESTE	MAYA MESSI	Libreville
81	JOSÉ	SALGUERO	Don Benito
82	FRANCISCO J	INGLADA	
83	BEATRIZ	PITARCH	Zaragoza
84	RAFAEL	BLANCO ARBE	Kaseda

HISPANAJ ESPERANTO - KONGRESOJ

N-ro	Jaro	Urbo	N-ro	Jaro	Urbo
1	1920	Barcelona	37	1977	Sabadell
2	1921	Zaragoza	38	1978	León
3	1923	Valencia	39	1979	Gijón
4	1924	Bilbao	40	1980	Madrid
5	1925	Córdoba	41	1981	Murcia
6	1926	Madrid	42	1982	Málaga
7	1928	Sevilla	43	1983	Zaragoza
8	1929	Oviedo	44	1984	Sevilla
9	1932	Madrid	45	1985	Cartagena
10	1933	Santander	46	1986	Vigo
11	1936	Barcelona	47	1987	Madrid
12	1951	Tarrasa	48	1988	Valencia
13	1952	Valencia	49	1989	Bilbao
14	1953	Bilbao	50	1990	Sant Cugat del Vallès
15	1954	Zaragoza	51	1991	La Laguna
16	1955	Gijón	52	1992	Mérida
17	1956	Barcelona	53	1994	Málaga
18	1957	Madrid	54	1995	Salou
19	1958	Castellón	55	1996	Murcia
20	1959	Málaga	56	1997	Valencia
21	1960	Pontevedra	57	1998	Valladolid
22	1961	Palma de Mallorca	58	1999	Castellón
23	1962	Valladolid	59	2000	San Seb. de los Reyes
24	1963	Barcelona	60	2001	San Javier
25	1964	Valencia	61	2002	Alicante
26	1965	Palencia	62	2003	Valencia
27	1966	Bilbao	63	2004	Bilbao
28	1967	Zaragoza	64	2005	Alcalá de Henares
29	1969	La Laguna	65	2006	El Puig
30	1970	Mieres	66	2007	Palos de la Frontera
31	1971	Alicante	67	2008	Cuenca
32	1972	Vigo	68	2009	Málaga
33	1973	Madrid	69	2010	Santiago Compostela
34	1974	Valladolid	70	2011	El Escorial
35	1975	Lleida	71	2012	Almagro
36	1976	El Ferrol	72	2013	Zaragoza

En la komenco, la nomo de la unuaj estis diversa. Ekzemple, la unua (en 1920) estis nomata UDKEILO: Unua Diskutanta Kunveno de Esperantistoj de Iberiaj Landoj.

En 1968 okazis la Universala Kongreso en Madrido, kaj en 1993 en Valencio.

Ĝis revido... kaj DANKON!

DANKON al ĉiu kunlaboranto kaj al ĉiu kongresano

DANKON al tiu mirinda D-ro Esperanto kies sento kondukis al nova lingvo

*Al bono celis ĉi doktoro
Esperanto fruktodone,
gloris ĝuste homaran ĥoron -
impresantan jam ĵargone -
konceptis lingvan mondpostulon.
Ni odas per rimanta strof'
ŝatante tiun unikulon.
Ŭa! Varsovia Zamenhof!*

(omaĝa alfabeto presita en "Monato")

DANKON al Cervantes, al Fernando de Diego kaj al ĉiuj kavaliroj de la Vorto(j)

La ABOCO de la AMO:

*Amanta, Bona, Ceremonia, Ĉarma, Diskreta, Eminentia, Firma,
Galanta, Ĝentila, Honesta, Ĥoriga, Ideala, Juna, Ĵetiĝema,
Kavalira, Lojala, Milda, Nobla, Oferema, Prudenta, Riĉa,
Servema, Ŝaŭma, Talenta, Uragana, Ŭaiga, Verdira, Zorga*

(CERVANTES/DE DIEGO/...: "KIĤOTO", ĉap. XXXIV, p. 261)

Ho ardu la koro en flamo

Ĝin hardu la fajro de amo

(K. K.: STREĈITA KORDO: Himno de amo)

Brulu ĉiam am' en

Viaj koroj amen!

(K. K.: STREĈITA KORDO: Maja idilio)

Beletra Almanako (BA)

BA estas literatura periodaĵo, lanĉita en septembro 2007, kun 140 ĝis 176 paĝoj. (*BA15*, esceptokaze, havis pli ol 190 paĝojn, kun tekstoj de premiitaj verkoj de la Belartaj Konkursoj 2012 de UEA.)

BA aperas trifoje jare, kun rubrikaj de i.a. poezio, prozo, eseoj, debatoj, recenzoj, teatro.

Redaktas Jorge Camacho (ĉefredakt.), Probal Daŝgupto kaj István Ertl. Eldonas Ulrich Becker (Eldonejo Mondial, Novjorko, Usono).



Mendoj / abonoj:

Plej facile: "Konstanta mendo" ĉe UEA!

(Skribu al libroservo@co.uea.org kun la peto pri "Konstanta mendo de BA" kaj vi ricevos aŭtomate ĉiun novan kajeron.)

Krome:

Mendu/abonu ĉe via landa/loka libroservo aŭ rekte ĉe:

www.beletraalmanako.com

Unuopaj kajeroj de *BA* estas ankaŭ facile aĉeteblaj en multaj ekstermovadaj libro-retejoj en multaj landoj; kaj vi eĉ povas mendi *BA* en via loka librovendejo, se vi havas la ISBN-numeron de la koncerna kajero!